

Vole... Novele de Raymond Schwartz

Beĉjo

Claude Gacond, 409-a radioprelego, 1971.08.11 & 14

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ĵus aperis novelaro sub la titolo *Vole...Novele*, kies aŭtoro estas Raymond Schwartz.

A.- Ni salutas la eldonon de tiu bele presita kaj fortike bindita libro fare de la eldonejo TK en Kopenhago. Tiu libro permesas al ni relegi novelojn jam de longe elĉerpitajn, kiuj siatempe aperis en *Prozo ridetanta* en 1920 kaj 1928. Aldone ni trovas novelojn de Raymond Schwartz, kiujn aperigis diversaj revuoj : *The British Esperantist*, *Literatura Mondo* kaj *La Nica Literatura Revuo*.

Cl.- Por vin instigi aĉeti tiun libron, ni legos al vi dum du elsendoj erojn el du noveloj. Hodiaŭ ni komencos per eroj el la novelo titolita *Beĉjo*.

A.- *Beĉjo estis la filo de malriĉa junulino. En la vilaĝo oni konis ŝin nur sub la nomo « la Piretin' ». Ŝi loĝis en domo soleca, je kelka distanco de l' aliaj domoj.*

Cl.- *Siatempe ŝia sana beleco kaj gaja humoro altiris al ŝia dometo tutan aron da admirantoj. Ankoraŭ hodiaŭ oni memoras en la vilaĝo pri multaj luktoj, kiujn eltenis konkurantaj farmservistoj, kaj ankaŭ mastrofiloj por konkeri enirrajton al la belulino. La tuta junularo de l' ĉirkaŭaĵo koketis kun ŝi. Tio estis la glorepoko de la Piretin'.*

A.- *Sed kiam, unu tagon, aŭdiĝis sub ŝia tegmento malforta krivoĉo de infaneto, la svarmo de ŝiaj adorantoj disflugis por ĉiam.*

Cl.- *Tiuepoke la Piretin', pekinta knabino, vivanta inter severaj leĝoj de l' vilaĝanaro, ekkonis la amarecon de subita izoligo. Forlasite de preskaŭ ĉiuj, ŝi pasigis la longajn vintrajn vesperojn tute sola ĉe la forn-angulo, premante al patrino sino sian etan feliĉon : Beĉjo ! Kaj dum longaj noktoj ŝi ploris super li sian mizeron.*

A.- *Pasie ŝi amis lin. Certe, ŝi zorgos kuraĝe pri li. Li estos ŝia konsolo. Li estos ŝia amo kaj ĝojo. Li grandiĝos, fariĝos hometo, sed... ne havos patron. La malfeliĉulo neniam havos patron.*

Cl.- *Kiam Beĉjo scipovis paŝi, li ne estis plu tenebla. Komence li trotetis ĉirkaŭ la dometo, poste tra la tuta vilaĝo. Pro lia ĝentila friponvizaĝeto oni amis lin. La farmistinoj amuziĝis kun li, donacis al li ŝmirpanon kaj, pie kunplektinte la manojn, ofte ekĝemis : « Ĉu ne domaĝe, ke tia anĝeleto estas la filo de pekulino ? »*

A.- *Beĉjo baldaŭ havis liberan eniron en ĉiujn stalojn. Li konis ĉiujn ĉevalojn, ĉiujn brutfamiliojn, la porkojn, la hundojn. Kaj ŝajnas, ke ĉiuj bestoj konis ankaŭ lin. Li povis pasi senpune inter la kruroj de timemaj ĉevalidoj ; la kortobirdoj ne emociiĝis, kiam Beĉjo vizitis ilin en la nestejo, rampante vulposimile tra la kokinpordeto. Kaj la farmistoj volonte toleris, ke iam li elsuĉu ovon ankoraŭ varmetan.*

Cl.- *La plej bona amiko de Beĉjo estis Musko.*

A.- *Musko estis viro simplanima, senmalica, kiu prizorgis la brutaron de la vilaĝestro. Li estis lameta kaj tial multe ŝatis, ke Beĉjo lin akompanis al la paŝtejoj, ĉar la infano, vigla kaj rapida kiel musteleto, faris al Musko pli da servoj ol lia maljuna hundo. Kaj Musko facile gajnis la amikecon de Beĉjo ; li sciis bone rakonti kaj havis certan provizon de tiuj naivaj fabeloj, kiuj reprezentas valoran literaturtrezoron tradicie hereditan en la vilaĝoj. Krome, li lerte tranĉis fajfilojn el sukhavaj saliketoj, kaj el seka lignaĵo li ĉizis diversajn pupfigurojn. Ĉiutage, rekompence por faritaj servoj, Beĉjo ricevis post la melkado plenan tasegon da freŝodora lakto.*

Vole... Novele de Raymond Schwartz

Beĉjo

Claude Gacond, 409-a radioprelego, 1971.08.11 & 14

Cl.- *Beĉjo amis Muskon. Li pasigis multajn horojn en herbejoj aŭ en la stalo, kie la melkisto havis sian pajloliton. Sed la Piretin' riproĉis al sia ideto tiujn longajn forestojn, ĉar ŝajnis al ŝia ĵaluza patrinkoro, ke la infano delasas ŝin. Des pli severe ŝi atentis, ke post la vespermanĝo Beĉjo ne forkuru refoje al la stalo de Musko. Li devis pasigi kun ŝi la vintrovesperojn. Tiam mankis al Beĉjo la rakontoj kaj amuzaĵoj de lia amiko, kaj iun tagon, kun infana logiko, li trovis facilan solvon por kontentigi ĉiujn. Li invitis Muskon al la patrina hejmo. Kaj la lamulo volonte venis. Estis pli komforte apud la forno de la Piretin' ol en lia stalo, kiun varmigis nur peza spirado de remaĉanta brutaro.*

A.- *De nun, dum la tuta vintro, Musko estis regula gasto. Li amuzis Beĉjon kaj lian patrinon per senfinaj babiladoj.*

Cl.- *Iun tagon, - estis dum akre frosta februarvespero, - Musko, kiel kutime, ekzakte, kiam la murhorloĝo montris la naŭan horon, leviĝis de sia seĝo por hejmeniri. Kiel ĉiuvespere li konstatis kun ŝercema vizaĝo : « Estos baldaŭ noktmezo ! Ni iru enlitiĝi ! » Sed hodiaŭ li ne rapidis por eliri. Li kvazaŭ hezitis. Ekstere faladis neĝo senhalte. Senbrida ventego hurladis ĉe la domanguloj. Lia mizera litaĉo neniel altiris lin, kaj pli ol iam li sentis la ŝarĝon de senfamiliulo. Kun preskaŭ envia deziro li rigardis la Piretinon. Kaj sen komplikaĵoj li celdiris : « Vi estas tre soleca ĉi tie, Piretin', ĉu ne ? »*

A.- *« Jes, Musko, ne ĉiam estas gaje... »*

Cl.- *« Nu, se vi volus, ni eble povus... Kion vi pensas ? »*

A.- *« Ni povus, - mi ne diras ne,... »*

Cl.- *Ses semajnojn poste Musko kaj la Piretin' geedziĝis. Sen ceremonio. La vesperon, kiel ĝis nun, ili pasigis ĉe la forno. Kiel kutime Musko tenis Beĉjon inter siaj genuoj kaj rakontis, rakontis pri la Nigra Hundo, kiu dum frostnoktoj vagadas tra la kamparo. Sed Beĉjo videble ne atentis. Pri kio li meditis en sia infana kapeto ?*

A.- *Jen li ekridetis friponete, forapense, kiel ridetas anĝeloj, kun serena seriozeco, kun pura feliĉsento. Li sin altigis ĝisside sur la genuojn de Musko, kaj – kvazaŭ por malkaŝi gravegan konfidencaĵon – li proksimiĝis al orelo de l' viro. Kaj nun, kvazaŭ konscia pri kio okazis dank'al li, Beĉjo plenhavis la buŝon por diri al Musko tute simple, unuvorte :*

Cl.- *« Paĉjo ! »*

A.- *Per tiu ero el bela novelo de Raymond Schwartz ni hodiaŭ finas nian legadon.*

Cl.- *Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !*

-oOo-